

*Gazeto*



*Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

26-a Jarkolekto \* Decembro 2010 \* N-ro 90



**ALOSNO**

**Fandangoj diskonigas ĝian nomon  
tutmondan**

Gazeto Andaluza

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

(esperanto14@ono.com)

Kunlaboris ĉi-numere: Ángel Arquillos,

## ENHAVO

Esperanto en Andaluzio .....	3
Meteorito super Andaluzio 1932 .....	7
Turismaj Broŝuroj en esperanto .....	8
Lingva Angulo .....	10
Libro-Servo de A.E.U. ....	13
Poezio .....	14
Ordinara Ĝenerala Kunsido de A.E.U.....	16
Naciaj Domajnoj ĉe Interreto .....	21
Esperanto kaj la Mara Flaga Alfabeto .....	24
Paĝoj pri Nia Historio. ....	27
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.....	30
Krucvortenigmo .....	32
Humoro.....	33
Turismi en Alosno (Onubo) .....	34
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio .....	38
Flamenko .....	40
Lastmomenta Informo .....	42

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## ESPERANTO EN ANDALUZIO



### KORDOVO

De la 4-a ĝis la 8-a de decembro 2010 okazis en Kordovo la 10-a Kongreso de la Anarkisma Sindikato CNT. Ĉeestis pli ol 500 personoj kaj inter ili reprezentanto de SATeH (SAT en Hispanio), la internacia asocio SAT estas la plej grava tutmonda organizaĵo de laboristaj Esperantistoj. José María Salguero, ekstremadura samideano, starigis budon ĉe la kongresejo kie li informos la CNT-anojn pri la internacia lingvo esperanto. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlaboris kun SATeH dum ĉi tiu CNT-Kongreso kaj tiel, ni faciligis la restadon en Kordovo de José María Salguero dum la kongresaj tagoj. Ni estas tute certaj, ke la propagando de nia lingvo kaj movado, plenumita de nia ekstremadura samideano, ne nur estos efektiva inter la CNT-anoj, sed ankaŭ inter la membroj kaj simpatiantoj de tiu sindikato loĝantaj en Andaluzio.



### GRANADO

La pasintan 11-an de decembro okazis en Granado la renkontiĝo de andaluzaj geesperantistoj okaze de la Zamenhofa-Tago. Ĉi-foje oni elektis Granadon por pristudi la eblecon organizi venontjare en ĉi tiu urbo la 16-an Andaluzian Kongreson de Esperanto. Malgraŭ la fakto, ke malmultaj personoj sukcesis ĉeesti la manĝadon, la etoso estis tre agrabla. Alvenis gesamideanoj de Malago, Sevilo kaj Jaeno kune kun franco loĝanta en Granado. Post matena vizito al la urbo, kun speciala



atento al la mondfama Alhambro, okazis kunsido kun komuna tagmanĝo ĉe la Junulara Gastejo de Granado, kie en tre bona etoso oni pasigis ankaŭ agrablan vesperon.

## SEVILO

La pasintan 5-an de marto 2011 okazis en Sevilo, kun la ĉeesto de 14 gesamideanoj, kunsido de Sevila Esperanto-Asocio cele al la organizado de la eventoj okazontaj dum la jaro 2011-a por inde festi la centjarigon de la esperanto-movado en Sevilo. Unue oni parolis pri la libro “Cent jaroj da esperanto en Sevilo”, kies aŭtoroj estos Antonio Rodríguez Gasch kaj Juan de Dios Montoto Sarriá, sevilaj esperantistoj. Oni organizos kelkajn publikajn prezentojn pri nia lingvo, la unua okazos en la Fakultato pri Flegado la proksiman 7-an de aprilo kie la sevilaj samideanoj José Roldán kaj José Pavón parolos pri nia lingvo kaj movado al la ĝenerala publiko.

Oni sciigis ankaŭ pri la demarŝoj por nomigi straton en Sevilo per la nomo “Esperanto”, oni informis pri la aproba sinteno de la respondeculo de la Urbodomo kiu promesis diskuti pri ĉi tiu afero ĉe la Urbodoma Konsilo. Same, oni parolos kun la proprietuloj de la konstruaĵo nuntempe ekzistanta sur la numero 75-a de la strato *Sol*, kie de la 7-a ĝis la 9-a jardeko de la pasinta jarcento troviĝis la *Academia Sevillana de Esperanto*, centro el kie oni disvastigis kaj instruis la internacian lingvon en Sevilo ĉefe dank’al la streboj de la ne-forgesebla samideano Tomás Caspe. La celo de Sevila Esperanto-Asocio estas meti sur la fasado de la nuntempa konstruaĵo azulehon memoriganta la tiutempan Esperanto-Akademion.

La fina projekto de la Asocio por festi la centjariĝon de la Esperanto-Movado en Sevilo estos la okazigo de koncerto la tagon 12-an de oktobro 2011-a. Kompreneble ĉi ĉiuj aktoj estos sufiĉe diskonigataj kaj al ili estos invitataj ĉiuj geesperantistoj en Andaluzio.

## ARUNDO

Komence de la pasinta monato decembro Fátima Jiménez kaj Juan Diego Díaz, gesamideanoj en Arundo (hispane: Ronda) sciigis pri la projekto starigi la Arundan Esperanto-Klubon. Fátima jam organizis antaŭ kelkaj jaroj, kunlabore kun la Arunda Urbodomo, kurso pri la internacia lingvo kaj ĉi-jare ŝi denove deziras instrui esperanton en sia urbo. Ni invitas al ĉiuj viziti la TTT-paĝon de la ĵus-naskita klubo kaj kunlabori kun ili. Temas pri juna grupo deziranta disvastigi nian lingvon en unu el la plej belaj urboj en Andaluzio.



Vizitu la TTT-paĝon de ĉi tiu nova grupo ĉe  
<http://esperantoarunda.blogspot.com/>

## MALAGO

La venontan monaton februaron vizitos Malagon, Ronalds Baby González, 24-jaraaĝa kubano, kiu restos en Malago dum kelke da tempo por sekvi superajn studojn en la tiea Universitato.

## SEVILO

Ekde la pasinta 4-a de novembro okazas ĉe la Municipa Kultur-Centro de la Casa de las Sirenas, Alameda de Hercules, en Seviljo, elementa esperanto-kurso.

Organizas ĝin Sevila Esperanto Asocio kaj ĝi okazas jaŭde de la 7:30 ĝis la 9:30 vespere. Pli da informoj estas eble ricevi ĉe [info@esperantosevilla.org](mailto:info@esperantosevilla.org)



---

Notu la TTT-adreson de la blogo de  
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo



<http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com/>

## METEORITO SUPER ANDALUZIO 1932

La 8-an de decembro 1932-a sur Arroyo de León, vilaĝeto en la provinco Onubo, falis sufiĉe granda meteorito. Okdek jaroj post tiu okazintaĵo universitata sciencisto ekigis seriozan esploron pri tiu asteroido. Unue, li vizitis la propran vilaĝon kaj tie li intervjuis ĉiujn maljunuloj kiuj eble ankoraŭ primemoris tiun tagon. Oldulino, tiam okjaraĝa, asertis, ke alproksimiĝis super la vilaĝon granda fajro-bolo kiu ekspuladis en la ĉielo kun granda lumo kaj bruoj. Neniu vundinto ĝi provokis, verŝajne la sola damaĝo estis la rompiĝo de ĉiuj vitraj fenestroj en la vilaĝo. Ankaŭ elektro-centralo paneis.



Neniu restaĵo aperis post la ekspluado, plejeble la asteroido malintegriĝis je 16 kilometroj super la tera surfaco, tiel, tuj post la eniro en la atmosferon, la asteroido ekperdis sian mason.


Dank'al kunlaborado de la usona spac-agenco NASA, la universitata profesoro D-ro José María Madiedo sciis, ke la asteroido falita sur Onubon estis tiu nomita 1990HA, kvalifikita de NASA kiel danĝera. Ene de ĉi tiu kvalifiko troviĝas ankaŭ pli ol mil aliaj asteroidoj troviĝantaj ne-malproksime de la Tero kaj ili estas sufiĉe grandaj por okazigi seriozajn damaĝojn se ili kolizias kontraŭ nian planedon. Ni memoru, ke la dinosaŭroj malaperis kiam antaŭ 65 milionoj da jaroj asteroido falis sur nian planedon.

Laŭ la esplorado la peco de tiu asteroido falinta sur Onubon mezuris nur 18 metrojn, pli malpli kvinetaĝa konstruaĵo, kaj ĝi eniris en la atmosferon je 54.000 kmoj/horo. La asteroido 1990 HA ĉirkaŭas la

sunon unufoje ĉiu kvar jaroj, tio signifas, ke ĝi ankaŭ pasas proksime al nia planedo ĉiu kvar jaroj. Por trankviligi ĉiujn, NASA asertas, ke la ebleco okazi nova kolizio estas proksimume egala al nulo.

## TURISMAJ BROŜUROJ EN ESPERANTO

Okaze de la pasinta Andaluzia Kongreso de Esperanto, Jaeno novembro 2010-a, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlabore kun la organizantoj de la Kongreso, eldonis du turismajn broŝurojn pri la urbo Jaeno. Sur unu el ili aperis kompleta informado pri la Jaena Katedralo, juvelo de la renasenca arkitekturo kaj sendube unu el la plej vizitindaj lokoj en la urbo Jaeno. La alia broŝuro temis pri la kvartalo *La Magdalena*, ĉar ĉe ĝi situis la kongresejo, kaj la organizantoj de la kongreso proponis dum ĝi piediran viziton al tiu antikva kaj tipa jaena kvartalo. Do, ambaŭ turismaj broŝuroj utilis unufoje kiel turismaj gvidiloj por la partoprenantoj en tiu Andaluzia Kongreso.





La eldonado de la broŝuroj estis sufiĉe altkvalitaj. Oni eldonis cent ekzemplerojn de ambaŭ gvidiloj, do ili povus utili ne nur por la partoprenantoj en la Kongreso, proksimume 30, sed ankaŭ por estontaj vizitantoj en la urbon Jaenon. La ideo estis lasi ilin ĉe la turisma oficejo de la Katedralo kaj ankaŭ ĉe la turisma informejo de Jaeno.

Pro la fakto, ke multaj gesamideanoj aplaŭdis la aperon de ĉi tiuj turismaj broŝuroj la Estraro de nia asocio pensis, ke estus bona ideo aperigi pliajn broŝurojn de aliaj urboj kaj de aliaj monumentoj tra la tuta Andaluzio. Do, dirite kaj farite, kun la kunlaboro de la ĵus naskita Arunda Esperanto-Klubo, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo eldonos baldaŭ du novajn turismajn broŝurojn pri Arundo kaj ili estos donacitaj al la turisma inform-oficejo de ĉi tiu belega malaga urbo.

La eldonado de tiaj broŝuroj havas duoblan kialon, unufoje ili utilas al eblaj esperant-lingvaj vizitantoj de la urbo kaj due, la simpla ekzisto de ĉi tiuj esperant-lingvaj rimedoj por faciligi turisman viziton en Andaluzion jam estas bona propagandilo por la lingvo mem. Imagu, ke post kelke da tempo apud jam ekzistantaj broŝuroj en la angla, franca, germana, itala kaj japana lingvoj pri, ekzemple, la Moskeo de Kordovo, ekzistus ankaŭ tiu sama broŝuro en esperanto. Efika propagandilo por nia lingvo!

Ĉu estus eble helpi al tiu projekto? Sendube jes. Ni ne petas al Vi monon aŭ redaktadon de la tekstoj. Ni nur petas al Vi sugestojn pri novaj monumentoj, urboj aŭ naturaj lokoj pri kiuj estus inde eldoni turisman broŝuron en esperanto, kaj ankaŭ estus grave koni ĉu iu el ni havas kontaktojn kun respondeculoj de lokaj turismaj inform-oficejoj, kun la celo doni la broŝurojn al ili kiam ni eldonos pliajn gvidilojn.

Por scii plie pri tiu projekto, bv. kontakti kun:  
Andaluzia Esperanto Unuiĝo  
(Turismaj Broŝuroj)  
Apartado de Correos 3142  
E-14080 Córdoba

## Lingva Angulo

### Petoj, deziroj kaj ordonoj: la uzo de la imperativo

Petojn, dezirojn kaj ordonojn al aliaj personoj oni esprimas pere de la imperativa formo de la verbo, tio estas pere de la u-finaĵo. Se temas pri petoj kaj ordonoj al alia persono kutime oni ne uzas la subjektan pronomon, tamen por akcenti ni povas uzi ĝin. Ekzemple:

- Skribu pli klare! (*¡Escribe más claro!*)

Temas pri peto aŭ pri ordono kaj la ricevanto komprenas perfekte ke la parolanto petas aŭ ordonas tion al li. Tamen oni povas diri ankaŭ:

- Filo, skribu pli klare! (*¡Hijo, escribe más claro!*)

Ĉi-kaze, la ricevanto de la ordono aperas konkrete ĉe la frazo, tio povas esti uzata por akcenti la peton aŭ ordonon, tamen tio ne estas necesa.

Se oni petas aŭ ordonas al dua persono, sed al ni mem aŭ al tria persono, ne aperanta en la konversacio, la uzo de la subjekto ĉe la imperativa frazo estas nepra. Tiel:

- Mi studu pli diligente, se mi deziras aprobi la ekzamenon.  
(*Tengo que estudiar más diligentemente, si deseo aprobar el examen*)

Ĉi-kaze temas pri ordono aŭ sugesto al mi mem.

- Li faru, kion li volas. (*Qué él haga, lo que él quiera*)

Temas pri ordono al tria persono, do la subjekta pronomo “li”, kiel ricevanto de la ordono devas aperi se oni deziras komprenigi perfekte la frazon.

La uzo de la u-finaĵo ankaŭ estas necesa ĉe ne-rekta parolado, tiel:

- Mi deziras, ke vi studu pli diligente.  
(*Deseo que tu estudies más diligentemente*)

Ne uzu: *mi deziras, ke vi studos pli diligente*, ĉar, kvankam la u-finaĵo montras ke la ago ne estas reala, sed ja ordonata, volata, celata aŭ dezirata, do ne aperas la tempo de la ago ĉe la frazo mem, tiu ago troviĝas en la estonteco. Komprenoble, se mi deziras ke io okazu, tio ja okazos estontence: post unu minuo, morgaŭ aŭ la venonta jaro, sed ĉiam estontece.

Same okazas, kiam la deziron oni esprimis dum la estinteco, ekzemple:

- Mi deziris, ke vi venu ĉe mi.  
(*Deseaba que tu vinieras a mi casa*)

Ĉi-kaze, kvankam la deziro okazis pasintence: *mi deziris*, oni daŭre devas uzi la u-finaĵon de la verbo, ĉar ĉi-maniere ni esprimas tion kion ni volas, deziras aŭ ordonas.

Same, se temas pri deziro:

- Mi dezirus, ke vi venu ĉe mi.  
(*Desearía que tu vinieras a mi casa*)

Interkrampe ni diru ankaŭ, ke oni uzas la u-finaĵon post “por ke”. Tio estas, por montri la celon de iu ago. Ekzemple:

- Mi ŝlosis la biciklon por ke oni ne ŝtelu ĝin.  
(*Amarré la bicicleta con llave para que no la robaran*)

Komprenoble tiu “por ke” ne estas la traduko de nia hispan-lingva “*porque*”, kiu ja devas esti tradukita kiel “ĉar”.

Tiel:

- Mi ŝlosis la biciklon ĉar mi volas eviti ŝtelon.  
(*Amarré la bicicleta con llave porque quiero evitar un robo*).

Se paroli pri ordonoj, unue ni devas substreki la fakton, ke oni devas eviti la infinitivan formon (i-finaĵo) por ordoni. Eble kelkfoje pro influo de naciaj lingvoj oni uzas infinitivon anstataŭ imperativo, tamen tio ne povas okazi en esperanto. Do, ne diru: *Ne krii! Studi!* Por esprimi ordonojn ests necese uzi la u-tempan verbon:

- Ne krii! (*¡No grites!*)
- Silentu! (*¡Guarda silencio!*)

Se ne temas pri ordono, sed ja pri peto, aŭ pri ordono dirita pere de ĝentila maniero, ni uzu: *Bonvolu...!* Ĉi tiu kunmetaĵo devenas de “bona volo”, do “kun bona volo” kaj ĝi esprimas la signifon “esti bonvola”, sed ne “bone voli”. Se ni uzas *bonvolu...!* ni nepre ne devas forgesi simplan regulon, oni ne povas uzi duoblan U-formon, do oni ne devas diri: *Bonvolu studu!*, sed ja *Bonvolu studi!* Kvankam ni, unuamomente, povas pensi, ke la ago ordonata de ni estas “studi”, reale ĝi estas “bonvoli”. Do, se uzata ĝentila formo por ordoni ni uzos: imperativon + infinitivo.

- Bonvolu studi! (*¡Por favor estudia!*)
- Bonvolu veni! (*¡Por favor ven!*)
- Bonvolu labori kiel eble plej efike!  
(*¡Por favor trabaja lo más eficazmente posible!*)
- Bonvolu esti ĝentila al mia patrino!  
(*¡Por favor sé gentil con mi madre!*)
- Bonvolu gardi ĉi tiun libron ĉe via biblioteko!  
(*¡Por favor guarda este libro en tu biblioteca!*)

Do, ne forgesu ĉi tiun simplan regulon:

Se oni deziras ordoni ion ĝentile: bonvolu + infinitivo,  
neniam bonvolu + imperativo.

Alia ĝentila formo por ordoni estas la uzo de la frazo *mi petas*. Ĉi-kaze, ni ja uzos la imperativan formon de la verbo, tio estas: la u-finaĵo. Oni povas diri, ke temas pri ordono sed mildigita per la frazo antaŭa aŭ posta *mi petas*. Ekzemple:

- Studu, mi petas. (*Estudia, por favor*)
- Morgaŭ venu nokto-manĝi ĉe mi, mi petas. (*Mañana ven a cenar a mi casa, por favor*)
- Se eble, akompanu min en la hospitalon, mi petas. (*Si es posible acompáñame al hospital, por favor*)

## Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni metas je la dispono de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jenajn verkojn eldonitaj de la Asocio.



### **PLATERO KAJ MI**

Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon.

Tradukis en esperanton: Miguel Gutiérrez Adúriz

Prezo: 8 eŭroj.



### **SANGA NUPTO**

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituus la restarigon de la pura tragedia sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonia.

Tradukis en esperanton: Miguel Fernández

Prezo: 6 eŭroj.

## Poezio



Luis de Gongora y Argote  
Kordovo 1561-1627

Je Kordovo

Ho, gloraj muroj! turoj de l' genio  
de digno, famo kaj majesto glora!  
Ho, riĉaj bedoj kaj montar' sunora  
el noblaj sabloj, sen orum-ebrio!

Ho, grandrivero de Andaluzio!  
Privilegias sun', ĉiel' favora!  
Ho, flor' el Hispanio! tre valora  
pri plumoj, glavoj kiel pri gracia!

Se inter ruboj, musk', restaĵoj tristaj  
frukta ĉar Darro kaj Genil' ĝin banas  
ne nutris min pri via sorĉmemoro...

Ne indu ĉi-okuloj de vi distaj  
vidon de l' turoj, mur', river', sunoro  
kaj montoj, ho patrio, flor' hispana!

2011-a

*450 datreveno de la naskiĝo de Luis de Góngora*



**ALIĜU AL**  
***Andaluzia Esperanto-Unuiĝo***

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: [andaluciaesperanto@gmail.com](mailto:andaluciaesperanto@gmail.com)  
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada  
2031 0225 54 0100187657
- BBVA  
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2011

**DANKON! Ni bezonas ĉies helpoj kaj apogon.**

**aeu**  
**Andaluzia**  
**Esperanto - Unuiĝo**

## ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE ANDALUZIA ESPERANTO – UNUIĜO

*Malago, la 8-an de januaro 2011*

En la urbo Malago, la 8-an de januaro 2011, renkontiĝis je la 11:50 horo ĉe la Junulara Restadejo, ordinara ĝenerala kunsido de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, hispanlingve Asociación Andaluza de Esperanto. Partoprenas persone en al kunsido 12 membroj, aliaj 4 estas reprezentitaj. Prezidas S-ro Ángel Arquillos López, kiel Prezidanto de la Asocio kaj la Sekretario estas S-ro Julio Herrero Segura.

Pritraktitaj Aferoj

1. Legado kaj eventuala aprobo de la akto de la pasinta kunsido.

La Sekretario legas la akton de la pasinta kunsido. Oni aprobas ĝin unuanime, sed kun la jena ŝanĝo proponita de kelkaj ĉeestantoj:

*“Sur la TTT-paĝo <http://www.sahara-esperanto.ueuo.com> aperas la kunlabro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kun la Fronto Polisario aŭ kun la sahara popolo. Se temas pri diskonigi la kunlaboradon de AEU kun projektoj, estas necese scii ĉu temas pri kunlaborado de la asocio mem aŭ de membro de la asocio. Se temas pri kunlaborado de la asocio estos necesa la aprobo de la membroj mem de la asocio”.*

2. Kontoj je la 31-a de decembro 2010.

La kasistino prezentas la jenan kontaron:

- Enspezoj dum 2010: 2.471,04 eŭroj.
- Elspezoj dum 2010: 2.332,56 “
- Favorsaldo dum 2010: 138,48 “



Antaŭa saldo je la 31-a de decembro 2009: 5.999,64 eŭroj.  
**Saldo je la 31-a de decembro 2010: 6.138,12 “**

Tiu mon-kvanto troviĝas ĉe:

- Caja de Ahorros de Granada → 1.134,50 euroj
- BBVA → 5.003,62 “

La kasistino informas pri la 25 membroj de la asocio kiu pagis la kotizon dum la jaro 2010. Pri aliaj 33 eŭroj pagitaj de du membroj ne estis eble koni la nomon de la pagintoj, ĉar la banko ne sciigis pri tiu datumo. La sekretario S-ro Julio Herrero sciigis, ke li pagis la kotizon, kiel protektanta membro de la Malaga Esperanto-Grupo, tamen li ne aperas en la listo de membroj kiuj pagis la kotizon.

Komenciĝis tiam debato pri la propono akceptita de la Ĝenerala Kunsido de la Asocio en la jaro 2006, rilate la akcepton kiel membrojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo de membroj apartenantaj al la lokaj andaluzaj grupoj. Tiokaze oni decidis dividi la 50% la kotizon de la membro inter ambaŭ asocioj, la andaluzia asocio kaj la loka grupo. En la jaro 2008 oni informis, ke nur la Malaga Grupo akceptis tiun proponon kaj poste tion mem faris la Jaena Esperanto-Asocio. Dum la debato, membro de la asocio asertis, ke tiu propono oni devus realigi rilate ĉiujn andaluzajn grupojn, ne nur tiu de Malago. La Sekretario respondis, ke ekde la alpreno de tiu propono oni oferis tiun eblecon al ĉiuj andaluzaj lokaj grupoj, tamen devas esti la grupoj mem tiuj kiuj devas peti la subskribon de la akordo kun AEU. Krome, la Prezidanto de la Malaga Esperanto-Grupo informis, ke en la jaro 2008 10 membroj de tiu grupo estis konsiderataj kiel membroj de AEU; en la jaro 2009 estis 11 membroj kaj en 2010 17 membroj, tamen neniam oni ricevis de AEU la 50% el al kotizoj favore al la Malaga Grupo. Membroj de aliaj grupoj, kiel tiuj de Arundo kaj Vélez-Málaga, demandis ĉu pere de la pago de la jara kotizo de AEU estas siafoje membroj de la Malaga Grupo. Oni decidis nenion ĉi-sence, do la Estraro de AEU debatos pri ĉi tiu afero jan en sia unua renkontiĝo de la jaro 2011.

### 3. Buĝeto por la jaro 2011.

La kasistino proponas la pluvalidigon de la buĝeto de la jaro 2010 por la jaro 2011. La Prezidanto de la Malaga Esperanto-Grupo memorigas, ke dum la pasinta jaro 2010 AEU ne pagis al la Malaga Grupo la 50% el la kotizoj de la malagaj membroj de AEU, entute 17 membroj do 170 eŭroj. Li konsideras, ke se oni decidus la pluvalidigon de la buĝeto de la jaro 2010 por la kuranta jaro 2011, estas eble supoziti, ke ankaŭ ne okazos la pago de tiu mono al la Malaga Esperanto-Grupo fare de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Post debato, oni decidus pluvalidigi la buĝeton de la jaro 2010 por la jaro 2011 kaj devos esti la Malaga Esperanto-Grupo tiu kiu decidus ĉu daŭrigi aŭ ne la akordon subskribita kun AEU rilate la dividon de la jaraj kotizoj inter ambaŭ asocioj.

### 4. Propono por nuligi la aliĝon de AEU al la Esperanta Civito.

La Prezidanto informas pri tiu propono kiu jam estis prezentita kaj debatita dum la Eksterordinara Ĝenerala Kunsido de AEU en novembro 2010, kadre de la 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Jaeno. Tamen, tiufoje ne estis eble voĉdoni pri tiu punkto ĉar ĝi ne aperis ene de la kunvoko por tiu kunsido, do, oni povis decidi nenion pri tio laŭ la nuntempa hispana leĝo pri asocioj. La Prezidanto proponas, ke la voĉdonado estos sekreta, tio estas aprobata de la plejmulto el la gepartoprenantoj.

La Sekretario informas al la gepartoprenantoj, ke la kialoj prezentitaj por nuligi la pakton inter AEU kaj la Esperanta Civito estas tute subjektivaj kaj ja estus necese debati pri kio signifas certe tiu pakto subskribita en la jaro 2001. Same, la Sekretario proponas anstataŭ nuligi la pakton ŝanĝi la reprezentanton de AEU ĉe la Esperanta Civito. Nuntempe tiun postenon okupas S-ro Ángel Arquillos, kiu jam diskonigas sian emon nuligi la akordon. S-ro Julio Herrero proponas

sin mem por tiu posteno, ĉar li estas favora rilate la daŭrigon de la akordo inter AEU kaj la Esperanta Civito. Post voĉdonado oni decidis ne aprobi la proponon de la Sekretario, kaj tiel oni daŭrigas la 4-an punkton de la tagordo, tio estas voĉdoni rilate la proponon nuligi la aliĝon de AEU al la Esperanta Civito kun la jena rezulto:

- 12 voĉdonoj favoraj al la nuligo.
- 3 sindetenoj.
- 1 voĉdono kontraŭa.

Post ĉi tio, la Sekretario de la Asocio, S-ro Julio Herrero Segura, komunikas sian demision kaj ankaŭ rilate sian agadon kiel respondeculo de la Libro-Servo kaj de la Instruada Servo de la Asocio.

#### 5. Proponoj kaj demandoj.

Fátima Jiménez kaj Juan Diego Díaz sciigas pri la demarŝoj cele la konstituo de grupo en Arundo (Malago). Nuntempe ili laboras por la fondiĝo de Esperanto-Grupo en sia urbo. Ili ankaŭ diskonigis la ideon okazigi dum la venonta printempo renkontiĝon en Arundo por antaŭenirigi la instruadon de esperanto en tiu malaga urbo. Same, ili deziras relanĉi la ideon krei junularan sekcion ene de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Kelkaj membroj de la Asocio esprimis sian deziron faciligi la komunikadon inter la membroj de la asocio kaj la andaluzaj grupoj, cele al tio estus eble krei forumojn aŭ grupoj en interreto kaj ĉefe klarigi la nuntempan ekziston de elektronikaj adresoj ĉe Google, Yahoo kaj aliaj serviloj.

Oni parolis pri la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazonta dum la jaro 2011 en Granado. Oni decidis, ke la unua kaj plej grava paŝo estos krei komitaton por la organizado de la Kongreso. Do, la Estraro de AEU kontaktos kiel eble plej baldaŭ kun tiuj membroj emaj kunlabori en la organizado de la Kongreso.

Kaj sen pliaj pritraktindaj aferoj finiĝis la Ordinara Ĝenerala Kunsido de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo je la 14:40 horo.

Subskribis:

*La Sekretario*

*La Prezidanto*

**Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:**

- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
andaluciaesperanto@gmail.com
- ✓ Malaga Esperanto-Asocio “Marbordo de la Suno”  
<http://www.ipernity.com/home/123729>
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto  
info@esperantosevilla.org
- ✓ Asociación Cordobesa de Esperanto  
esperanto14@ono.com
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio  
ridinda@gmail.com
- ✓ Club de Esperanto de Ronda  
esperantoarunda@gmail.com
- ✓ Asociación Onubense de Esperanto  
rafmagon@yahoo.com
- ✓ Esperanto el Kadizo  
esperantokadizo@gmail.com
- ✓ Bulteno “Monate ĉe Vi”  
angelarquillos@gmail.com
- ✓ Revuo “Gazeto Andaluzia”  
esperanto14@ono.com

## NACIAJ DOMAJNOJ ĈE INTERRETO

Domajna nomo estas la interreta nomo de ĉiu komputilo. La domajnoj ne apartenas al ununura klaso, male ili iras el la plej alta nivelo ĝis ĉiu aparta komputilo. La domajno de plej alta nivelo troviĝas post la lasta punkto en la adreso de la komputiloj, kaj ili povas esti:

- Nacia domajno de plej alta nivelo.
- Ĝenerala domajno de plej alta nivelo.

La ĝeneralaj domajnoj de plej alta nivelo estas uzataj de specifaj klaso de organizoj, ekzemple:

- *.com* por komercaj organizaĵoj.
- *.info* por amasmedioj, ĵurnaloj kaj revuoj.
- *.gov* por la usona registaro.
- *.gob* por alilandaj registaroj.
- *.net* por entreprenoj rilataj al interreto.
- Kaj multaj aliaj kiel *.biz .mil .info ....*



La nacia domajno de plej alta nivelo estas alpropigita por landoj aŭ dependaj teritorioj. Ili konsistas ĉiam el du literoj, kaj pere de tiu finaĵo estas eble koni la nacian aŭ teritorian devenon de la interreta adreso. Tiuj du literoj estis elektitaj laŭ la internacia landokodo, kvankam ekzistas kelkaj esceptoj.

Ni ĉiuj konas multajn naciajn domajnojn de plej alta

nivelo, ekz. *.es* : Hispanio; *.fr*: Francio; *.pt*: Portugalio; *.uk*: Britio. Tamen, ekzistas kelkaj kuriozaj rimarkindaĵoj pri ĉi tiuj naciaj domajnoj, ni vidu la jenajn:

*.us* → Kvankam temas pri la nacia domajno de Usono estas necese averti, ke ĝi estas apenaŭ uzata. Interreto naskiĝis en Usono, do oni konsideras en tiu lando ne necese uzi la propran nacian domajnon, ĉar ili inventis la reton. Oni preferas tie uzi la ĝeneralajn domajnoj de plej alta nivelo: *.com .net* ....

*.aq* → Kiel dirite, la naciaj domajnoj de plej alta nivelo ne nur rialtas al sendependaj ŝtatoj, sed ankaŭ al teritorioj. *.aq* estas la nacia domajno de la antarktaj teritorioj.

*.eu* → Kompreneble ĉiuj eŭropaj ŝtatoj posedas propran nacian domajnon (*.es .fr .pt .it .de .nl .dk* ...) Sed ankaŭ ekzistas la domajno *.eu* libere adoptita de tiuj kiuj deziras favorigi la eŭropan identecon. Do, la uzo de la domajno *.eu* sciigas pri la eŭropa deveno de la adreso kaj ankaŭ de la eŭropeemo de la uzanto. Estas necese elstari la koincido inter tiu eŭrop-devena *.eu* kaj la komenco de la nomo de Basklando en la baska lingvo, tio estas *Euzkadi*. Tiel, organizoj kaj unuopuloj en Baskio alprenis por siaj adresoj la origine eŭropan *.eu*, sed ĉi-foje por montri la baskan devenon de la adreso.

La koincido inter la literoj asignitaj al iu lando kaj internaciaj mallongigoj favoris la uzadon de tiuj kelkaj naciaj domajnoj alicele, ekzemple:

*.tv* → Ne nur temas pri la nacia domajno de la insulo Tuvalo ĉe la Pacifica Oceano, sed ĝi ankaŭ estas uzata de televidaj kompanioj en la tuta mondo.

*.fm* → La domajno de la Mikronezia Federacio estas ankaŭ uzata de radio-elsendejoj.

Oni diris antaŭe, ke la naciaj domajnoj konsistas ĉiam el du literoj, kio okazas do, kun la domajno *.cat* ? Nu, ekde la komenco de atribuo de nomoj al landoj kaj dependaj teritorioj fare de tiucela

Internacia Komitato, katalunaj kolektivoj petis la uzon de la domajno .ct . En la jaro 2005 oni asignis novan domajnon .cat al tiuj interretaj adresoj favorigantaj la lingvon kaj kulturon katalunan. Temis pri la unua domajno asignita ne al lando aŭ dependa teritorio, sed ja al lingva komunumo.

Tuj, kelkaj esperantistoj profitis tiun okazintaĵon kaj ili proponis la atribuan de la domajno .eo al alia lingva komunumo: la esperantistaro. Tamen, ĝis nun oni ne sukcesis havi propran domajnon de la Esperanto-Movado.

Same okazis ĉi tie en Andaluzio. Post la sukcesa iniciativo de katalunaj unuopuloj kaj organizoj, en nia tero aro da interret-uzantoj petis la alpropigon de la domajno .and . Tamen, ja tio estas malfacila afero, ĉar, kiel dirite, la domajnon .cat oni asignis al komunumo kiu ne posedis propran ŝtaton sed ja propran lingvon, male Andaluzio ne posedas propran idiomon. Tamen, estus bona ideo disponi pri la domajno .and, sendube nia andaluza Esperanto-movado povus fiere montri la jenan kaj revatan adreson: [www.esperanto.and](http://www.esperanto.and)



## GAZETO ANDALUZIA

90 numeroj apud Vi, cele la disvastigadon de esperanto en Andaluzio kaj la diskonigadon de la andaluza kulturo en la tuta mondo.

## ESPERANTO kaj LA MARA FLAGA ALFABETO



*esperanto*

Kiam ne estis ebla la per-radio komunikado inter la ŝipoj en la maro la sola ebleco por starigi tiun komunikadon estis la uzo de diverskoloraj flagoj, ĉu pendumitaj en masto, ĉu uzataj de signal-flagetoj reprezentantaj la literojn. Kvankam verŝajne la amasa kaj deviga uzado de radio-aparatoj ĉe ŝipoj en la tuta mondo igis tute necesa la uzadon de tiuj signal-flagoj, ankoraŭ ĉiuj ŝipoj, militaj kaj civilaj, uzas ilin, por vida longdistanca interkompreniĝado ĉefe inter surmaraj ŝipoj kaj la havenoj.

La nuntempaj signal-flagoj estis difinitaj en la jaro 1931 de la Internacia Mara Organizo –IMO– kaj ili konsistas el 40 flagoj, el kiuj 26 reprezentas literojn, 10 numeralojn, 1 flago estas konfirmiga kaj 3 ripetigaj. Krome la literaj flagoj, solaj aŭ kunigitaj, havas alian signifon, krom la litero reprezentata, tiel ekzemple la uzo de la flago reprezentanta la litero C indikas “jes”; la litero V sciigas pri “*mi petas vian helpon*”; la literoj CP “*mi helpos vin*”, ktp.


Kiel dirite, ekzistas 26 flagoj reprezentantaj la literojn, tamen tiuj literoj apartenas al la angla lingva alfabeto, tiel oni ne povas uzi vortoj kun la literoj Ā, Ç, Ñ, Ł, ktp. Kompreneble, ankaŭ ne la esperantaj literoj Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ kaj Ŭ, tio estas la supersignitaj literoj.

Tamen, ĉu ne estus eble montri esperantlingvan mesaĝon pere de signal-flagoj sur ŝipo? Jes! Oni ne scias kiam aperis jena propono,




tamen ĝi estis tute akceptita de tiuj esperantistoj kiuj fakis pri maristaj aferoj. Temis pri la anstataŭigo de la blanka aŭ flava parto de flago reprezentanta literon sen ĉapelo pere de la verda koloro, kaj tiel oni montras la ĉapeligita litero. Ni vidu:


Litero C laŭ la flaga kodo




Proponita litero Ĉ




Litero G laŭ la flaga kodo




Proponita litero Ĝ



Litero H laŭ la flaga kodo




Proponita litero Ĥ



## Litero J laŭ la flaga kodo



## Proponita litero Ĵ




## Litero S laŭ la flaga kodo




## Proponita literoŜ



## Litero U laŭ la flaga kodo



## Proponita litero Ŭ

Vortareto pri ŝipoj

Velŝipo



Vaporŝipo



Militŝipo / Aviadil-ŝipo



Kanuo



Boato



Pirago

## Paĝoj pri Nia Historio

### ***Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio***

*La unua kurso de esperanto organizata en Sevilo*

Dum la jaro 2011 la esperanto-movado en Sevilo festos sian unuan jarcenton. En la jaro 1911 oni fondis la Sevilan Esperanto-Asociacion, sed unu jaro antaŭe, dum la printempo de la jaro 1910, okazis la unua kurso de la internacia lingvo esperanto en Sevilo. La inaŭguran prelegon kaj la dek unuajn lecionojn disdonis la katedriisto pri la franca lingvo S-ro Casto Vilar y García. Li estis prestiĝa lingvisto, aŭtoro pri diversaj fonetikaj kaj leksikografiaj verkaĵoj pri la franca lingvo.

Post tiuj unuaj lecionoj la kurson daŭrigis S-ro Trinidad Soriano, kiu ja estis la vera organizanto de tiu unua kurso okazanta en la *Sociedad Económica de Amigos del País*, ĉe la strato *Rioja*, ĝuste sur la plej centra kaj komerca kvartalo de Sevilo. La lernantoj de tiu unua kurso estis:

- Pedro Ruiz Prieto, famega sevila kuracisto.
- Rafael Fiol Paredes, tiam gimnazia studento.
- Jerónimo Casarrubia, ankaŭ gimnazia studento.
- Joaquín Machuca, studento.
- Ceferino Berlot, eminenta muzikisto.
- Rafael Oliva, ankaŭ muzikisto.
- Carlos Martínez, profesoro pri takigrafio.
- Zabala, mon-hava komercisto en Sevilo.
- Jerónimo de Córdoba, pastro.
- Manuel Sánchez, junulo.
- Rita de Hipola
- Alfonso Escobar.
- Manuel Rincón Álvarez, studento.

S-ro Manuel Rincón Álvarez, poste estus instruisto en la urbo Sevilo kaj li menciis tiun unuan kurson de esperanto en sia libro *“Recuerdos de la Sevilla Pintoresca de 1890 a 1910”*, eldonita en la jaro 1959.

Laŭ sciigoj de Manuel Rincón, la kurso daŭriĝis tri monatoj kaj ĉe la etoso disvolviĝis samideana kunfratiĝo, malgraŭ la partopreno de tre malsimilaj personoj, inter ili anarkistoj, konservativaj burĝuloj, religiulo, ktp.

La duan kaj trian kurson oni organizis dum la sekvantaj jaroj, kaj tiam la profesoro estis Ceferino Berlot, lernanto en tiu unua jaro. Kelkaj el tiuj unuaj lernantoj poste estus aktivaj esperantistoj. Inter ili, Rafael Fiol Paredes, kiu post tiuj studentaj jaroj fariĝis kuracisto kaj li atingus altan rangon ĉe la hispana armeo. Li estis aktiva esperantisto dum sia longa vivo, li mortis en la jaro 1990,

preskaŭ cent jaraĝa, kaj ĝis sia lasta vivojaro li ricevis afable ĉiujn geesperantistojn pretaj viziti lin. Li ankaŭ estis Delegito de Universala Esperanto-Asocio en Sevilo ĝis sia forpaso.

Ankaŭ famega esperantisto estus poste Carlos Martínez, konata kiel *Karolo*, animo de la Sevila Esperanto-Asocio dum multaj jaroj,



S-ro Trinidad Soriano  
Organizanto de la unua kurso de esperanto en Sevilo kaj animo de la posta Sevila Esperanto-Asocio.

antaŭ kaj post la civila milito. Konata kiel esperantisto ankaŭ estis la Pastro Jerónimo de Córdoba, agnoskata kiel unu el la plej kleraj latin-lingvistoj en Hispanio kaj pri kiu oni parolis sur pasinta numero de nia revuo.

La organizado de ĉi tiu unua kurso en la jaro 1910 favorigis la starigon unu jaron poste de la Sevila Esperanto-Asocio. Feliĉe, ekde tiam la esperanto-movado vivis kaj vivas en Sevilo.

---

1911  2011

Centjariĝo de la Esperanto-Movado en Sevilo



Asociación Sevillana de Esperanto

## Internaciaj Esperanto-Asocioj

### *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI*

ILEI estas la asocio kie kolektiĝas la instruistoj kaj edukistoj de la internacia lingvo esperanto. Ne temas pri asocio por profesiaj instruistoj, sed por tiuj personoj, profesiuloj aŭ ne, kiuj instruas esperanton. Ĝi havas sekciojn en pli ol 30 landoj kaj membrojn en 45

ŝtatoj, kaj sendube ĝi estas la plej nombra kaj aktiva faka sekcio de la esperanto-movado.



Por esti membro de ILEI oni devas instrui esperanton aŭ esti instruisto de aliaj lingvoj aŭ fakoj kaj deziri interŝanĝi spertojn kun alilingvaj kolegoj en esperanto. Same, ĝi estas la asocio por tiuj personoj kiuj volas gvidi kursojn en kluboj aŭ pere de la reto, do oni ne necesas posedi universitatan diplomon pri instruisteco por esti membro de ILEI.

ILEI naskiĝis en la jaro 1949 kaj inter siaj ĉefaj celoj troviĝas akceli la instruadon de esperanto, trejni instruistojn, okazigi ekzamenojn, eldoni modernajn lernilojn kaj proksimigi kaj kunordigi esperanto-klasojn. La revuo *Internacia Pedagogia Revuo*, aperanta 4-foje en la jaro, estas la oficiala organo de la asocio. Krome, ILEI eldonas ankaŭ la revuon *Juna Amiko*, aperanta 3-foje en la jaro. Ĉi tiu revuo estas tre alloga, ĝi celas precipe tiujn kiuj jam konas la fundamenton de esperanto, scias la bazajn gramatikajn regulojn sed ne trovas legaĵojn en esperanto kiel eble facila. Sen vort-klarigoj la revuo uzas nur 1.500 vortojn, kompreneble la plej oftajn. Ĝi havas rubrikojn por infanoj, por lernejoj kaj por komencantoj de ajna aĝo.

La por-instruista asocio organizas ĉiujare konferencon, ofte unu sejmano antaŭ la okazigo de la Universala Kongreso kaj en la sama urbo. Ene de la ILEI-konferencoj okazas klerigaj, organizaj kaj kulturaj programoj pri trejnado de instruistoj, flego de ekzamen-sistemoj, reta kaj distanca lernado kaj similaj kampoj.



La Prezidanto de ILEI estas la nov-zelandano Stefan MacGill kaj la sidejo de la asocio troviĝas ĉe la sama sidejo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo (Nederlando). Viziteblas la TTT-paĝo de ILEI sur interreto ĉe <http://ilei.info/> En Hispanio antaŭ jardekoj estis tre aktiva la sekcio de ILEI, kaj famega sia perkoresponda kurso, pere de kiu lernis la internacian lingvon centoj da personoj. Sed nuntempe, ne ekzistas sekcio de ILEI por la tuta Hispanio, tamen antaŭ kelkaj jaroj sekcio de ĉi tiu por-instruista asocio

ekfunkciis en Katalunio, vizitu ĝian TTT-paĝon ĉe <http://www.xtec.es/~pmarti10/espvers.htm>

---

Ĉu Vi ankoraŭ ne pagis Vian kotizon por la jaro 2011 ?

Se Vi deziras helpi nin en la disvastigado de esperanto en Andaluzio, aliĝu al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

## KRUCVORTENIGMO

	A	B	C	Ĉ	D	E
1						
2						
3						
4						
5		■			■	
6						
7			■	■		■
8						

1. Malsovaĝa speco de besto, ofte uzata por medicina eksperimentado.
2. (Inverse) Unu el la konsistiga elemento de la loko en la haŭto, precipe ĉe piedoj aŭ manoj, malmoliĝinta pro la frotado.
3. (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Senkolora likvo, produktata per distilo kaj uzata en la fabrikado de artefaritaj farboj.
4. (Sen la lasta vokalo) Kaŭzo de malplezuro al iu, kontraŭstarante al ties intencoj aŭ deziroj.
5. Adverba finaĵo. ■ Nedifina pronomo montranta iun objekto, aferon aŭ ideon. ■ Sustantiva finaĵo.
6. (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Milita ekzercado ŝajniganta batalon.
7. (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Malgranda. ■ Konsonanto.
8. (Inverse) Amaso da densa akva vaporo, formiĝanta en la malsupra atmosfero kaj malklariganta la vidon.



- A. Verko sonateca por orkestro kun soloinstrumento.
- B. (Inverse) Unujara herbo kun du-floraj spiketoj en kunmetita paniklo kreskanta en sekaj lokoj. ■ (Sen la lasta vokalo) Granda forta peco el tolo aŭ alia samefika materialo, fiksita ĉe la mastoj kaj etendita por kapti la venton kaŭ antaŭenigi la akvoveturilon.
- C. Eŭropa Ŝtato ■ Verba finaĵo.
- Ĉ. (Akuzative) Moviĝo por atingi iun aŭ ion. ■ Konsonanto.
- D. (Inverse) Internaj ■ (Sen la lasta vokalo) Irvojo en ĝardeno aŭ parko inter du vicoj da arboj.
- E. (Inverse) Eŭropa Ŝtato. ■ Akuzativa finaĵo.

## Humoro



## Turismi en ... ALOSNO (Onubo)

Alosno estas vilaĝo en la onuba provinco, okcidente de Andaluzio. Ĝi troviĝas sur la regiono Andevalo, je 43 kmoj de la urbo Onubo. La vilaĝo, kune kuna la apuda vilaĝeto Tharsis, havas 4.700 enloĝantojn. Antaŭ kelkaj jaroj oni eltrovis gravajn arkeologiajn restaĵojn ĉe loko nomita *Cabezo Jure*, verŝajne tiuj restaĵoj apartenas al la tria miljaro a.K.. Oni trovis pintojn de sagoj, potojn, kaj metalajn objektojn



*Blazono de ALOSNO*

La vilaĝon oni fondis en la jaro 1444 kiam la enloĝantoj de la najbara vilaĝeto El Portichuelo petis al la Duko de Medina Sidonia rajtigojn por forlasi sian vilaĝon kaj refondi ĝin sur loko nomita El Alosno. Verdire El Portichuelo estis malsana loko, ĉefe pro la poluado de la akvo, malpurigitaj de la minista agado. La akvo de tiuj apudaj zonoj estis tute ne-taŭgaj por la terkulturado aŭ por la best-bredado. La Duko de Medina Sidonia akceptis la peton kaj li rajtigis la enloĝantojn de El Portichuelo starigi novan vilaĝon sur tiu loko nomita Alosno.

La min-riĉeco de la onuba regiono Andevalo estis konata de la plej antikvaj epokoj. Jam la tertiŝanoj komercis kun la mediteraneaj popoloj dank'al la metaloj eltiritaj de la riĉaj minejoj, ĉefe kupro kaj pirito. Historie la divido de la vilaĝo en du zonoj: Alosno kaj Tharsis ankaŭ estis divido de la ekonomia vivo de la urbo. En Tharsis la plej grava ekonomia rimedo estis la minejoj, male en Alosno la plej gravaj viv-rimedo estas la agrikulturo kaj la best-bredado.

En la jaro 1812 oni deklaris Alosnon kiel vilaĝon kaj dum tiu jarcento Alosno atingis grandan riĉecon dank'al la min-industrio kaj al la komerco. Tamen la ĉesado de la minista aktiveco kaŭzis grandajn malprofitojn en la ekonomia vivo de la urbo, kiu nuntempe serĉas novajn ekonomiajn rimedojn ĉe la kampara turismo kaj en la terkulturaj produktaĵoj de la nordo de la onuba provinco.



*Aera vidaĵo de Alosno*

### Monumentoj

- Preĝejo *Nuestra Señora de Gracia*.

Temas pri la plej grava konstruaĵo en Alosno, starigita inter la jaroj 1785 kaj 1793. Oni konstruis sur pli antikva preĝejo de la 16-a jarcento.



- Preĝejo de la Señor de la Columna

Starigita kiel ĉiuj preĝejoj, ekstere de la urbo, nuntempe ĝi troviĝas ene de Alosno. Malgraŭ ĝia arkitektura simpleco ĝi estas unu el la plej belaj preĝejoj sur la onuba provinco.



- La Reĝa Strato

Temas pri la plej grava strato sur la urbo, pro tio la popola folkoro en Alosno kantas pri ĝi ĉe la tipaj *alosauraj fandangoj*:

*“Reĝa Strato sur Alosno,  
kun ĝiaj anguloj ŝtalaj,  
jen la strato plej bela  
trairata de l’alosauranoj  
kiam la luno foriras...”*

Oni devas diri, ke ĉiuj strat-anguloj sur tiu strato estas plifortigitaj pere de ŝtalaj lamenoj.

### La Fandangoj

Kvankam origine, la fandango estas populara popoldanco, post la 19-a jarcento ĝi ankaŭ estas unu el la plej fundamentaj branĉoj de la flamenka kantado. La vilaĝo Alosno estas la lulilo de la Onuba Fandango, tiu flamenka kantado ekzistanta ĉe la onuba provinco kaj ĝi

ofte kantas la vivon, kutimojn kaj sentoj de Alosno kaj la Alosnanoj, sendube ĝi estas la sento de la tuta vilaĝo.

Nuntempe la Alosna Urbodomo organizas Nacian Konkurson de Fandangoj kaj estontece eĉ oni pripensas la organizadon de prelegoj kaj ekspozicioj pri ĉi tiu flamenka branĉo.

### Gastronomio

La vintro estas la buĉ-sezono, do estas tre tipaj la porkaĵoj: *pestorejo asado, cachuelo, olla de coles...* Ankaŭ dumvintre estas tre ŝatataj la fungoj nomitaj *gurumelos*. Dumpaske oni preparas la *bollos de pringue*, kaj ene de ili troviĝas ovo. Tre bongustaj estas tipaj dolĉaĵoj kiel: *engañabobos, cagajones de puño, gañotes*, ktp.

### Festoj

La 16-an de januaro, Sankta Antono Abato Patrono de la bestoj, oni starigas en Alosno grandaj fajroj, super kiuj oni saltigas ĉevalojn kaj azenojn, tiel oni protektas ilin kontraŭ la malsanoj.

Dum la Paska Dimanĉo okazas la *Pasko de la Laktuko*. Aroj da geamikoj iras en la kamparon akompanitaj de pupoj el pajlo, simbolantaj Judason. Fine de la tago oni bruligas la pupojn.

La 8-an de decembro, festo de la Senpeka Koncipiteco de la Virgulino Maria, oni starigas grandajn kolonoj el herboj, ornamitaj de standardetoj, nomitaj *jachas*. Dumnokte oni bruligas ilin por festi la Virgulinon Marian.

Venont-numere Turismi en .....

TARIFA (Kadizo)

## Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

### Margarita Carmen Cansino

Sur alia numero de nia revuo ni parolis pri la *ebla* andaluza origino de Walt Disney, ĉi tiu afero neniam estis tutklare provita, tamen ekzistas kelkaj konitaĵoj kiuj ebligis certigi tion. Sed pri la andaluza origino de diino de la hollywooda stelaro ja ekzistas tuta certeco, temas pri Margarita Carmen Cansino, ĉies konata kiel Rita Hayworth.



Margarita Carmen Cansino  
*Rita Hayworth*  
1918 - 1987

Ŝi naskiĝis en la jaro 1918-a en Novjorko, ĉe la kvartalo Broklino. Ŝia patro estis la dancisto Eduardo Cansino, kiu naskiĝis en la andaluza vilaĝo Castilleja de la Cuesta, provinco Sevilo. Ŝia patrino estis Volga Hayworth, irland-itala devena.

Eduardo Cansino kaj lia fratino, ambaŭ dancistoj, elmigris en Usonon kaj tie ili kreis la danc-paron *The Dancing Cansinos*. Ili triumfis en Novjorko, tamen fine ili disigis la artan paron kaj tiam Eduardo, kune kun sia edzino kaj filino, foriris en Kalifornion por eklabori ĉe la kin-industrio. Post la krizo de la jaro 1929-a li decidis renaskigi la danc-paron *The Dancing Cansinos*, tamen tiufoje la partnerino ne estis lia fratino sed lia filino Margarita.

Ili ludis ĉefe ĉe danc-salonoj de la meksika urbo Tiĥuano, tuj apud la usona landlimo. Tiujn salonojn ofte ĉeestis produktoroj de la hollywooda kin-industrio. Estrarano de la kin-kompanio *Fox* vidis al Margarita Cansino danci, kaj tiam li proponis al ŝi labori en filmo, li promesis al ŝi esti la nova latin-devena diino de la kino, por anstataŭi la meksikan Dolores del Rio.

Komence ŝi laboris en pluraj malgrandaj filmroloj, tiam ŝi ankoraŭ uzis sian nomon Rita Cansino, tamen kiam ŝi sukbsribis kontrakton kun la kin-kompanio *Columbia*, al la reprezentanto ne plaĉis la nomo Cansino, kaj ŝi ŝanĝis sian nomon laŭ la nomo de sia patrino, tiam naskiĝis *Rita Hayworth*. Ŝi laboris apud aliaj gigantoj de la hollywooda kin-industrio, Cary Grant en la filmo *Only Angels Have Wings*, jaro 1939-a, apud kaj Fred Astaire en *You'll Never Get Rich*, 1941-a kaj denove en *You Were Never Lovelier*, 1942-a. La pinto de ŝia kariero estis la filmo *Gilda* apud Glenn Ford, en la jaro 1945-a. Ŝi edziniĝis al Orson Welles kaj poste al princo Aly Khan. Post tiu nupto ŝi jam apenaŭ aperis sur pliaj filmoj.

En la jaro 1987-a mortis en Novjorko ĉi sevil-devena aktorino kiu sisteme estis konata kiel la Diino de la Beleco.

Aunque en el número anterior se informó de la posibilidad de realizar en Granada el 16º Congreso Andaluz de Esperanto, éste finalmente se organizará en Sevilla, en tanto que los esperantistas de esta ciudad están llevando a cabo diversos actos para conmemorar el Primer Centenario de la Asociación Sevillana de Esperanto.

Por eso invitamos a todos los esperantistas y simpatizantes de la lengua internacional, a tomar parte en este Congreso que se celebrará en Sevilla en el fin de semana del 15 al 16 de octubre.

La información sobre programa, alojamiento, visitas, etc se irá colgando en el blog de la Asociación:

<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

## FLAMENKO

La flamenka kantisto Enrique Morente forpasis la pasintan monaton decembron en Granado. La kantisto luktis dum kelkaj tagoj ĉe hospitalo, tamen bedaŭrinde li forpasis post ĥirurgia operacio. Enrique Morente naskiĝis en Granado en la jaro 1942. Infan-aĝe li ekkantis en la ĥoro de la Granada Katedralo kaj tuj poste li interesiĝis pri la flamenka kantado. Kiam li estis 14-jaraĝa li translokiĝis en Madridon, tie li kontaktis kun aliaj gejunuloj kiuj ĉeestis ofte la flamenkajn salonojn, tiel li konis persone al Pepe de la Matrona, kiu jam okdejarĝa ankoraŭ kantis kaj instruis tiujn junulojn dezirantaj lerni la sekretojn de la flamenka kantado.



La debuto de Enrique Morente okazis en la jaro 1964 kaj en tiu sama jaro li marŝis en Novjorkon por kanti ĉe la Monda Foiro okazanta en tiu usona urbo kaj poste eĉ en la Hispana Ambasadego en Vaŝingtono. Kiam li revenis en Andaluzion li partoprenis en flamenka festivalo apud aliaj konataj kantistoj kiel Juan Talega, Fernanda kaj Bernarda de Utrera kaj Antonio Mairena, tiu festivalo okazis ĉe la Sevilla Alkazaro.

En la jaro 1967-a aperis lia unua disko, akompanita gitarlude de Felix de Utrera. Ene de tiu disko aperis diverstilaj kantadoj, tiel malgraŭ lia juna aĝo, apenaŭ 27-jaraĝa, Enrique Morente kuraĝis ludi malfacilajn aŭ ne tre konatajn kant-stilojn, kiel kantaĵoj de *Pedro El Morato*, tiuj de *Frasquito Hierbabuena*, *mirabras*, *cañas*, ktp. Tiutempe aliaj flamenkaj kantistoj, kiel Fosforito, Manolo Caracol aŭ Antonio Mairena kutime surbendigis nur konatajn kantaĵojn, kiel *soleas*



aŭ *seguiriyas*. Eble pro tiu kuraĝo li ricevis Specialan Mencion de la Katedro pri Flamenkologio de Jerezo en la jaro 1968.

En la jaro 1970 li renkontiĝas kun Manolo Sanlucar, unu el la plej prestiĝaj flamenkaj gitaristoj, tiu profesia rilato daŭriĝis dum multaj jaroj, kaj kune ili ludis, unuafoje en la historio, ĉe la Ateneo de Madrido, la flamenka arto eniris en la plej prestiĝan kulturalan institucion de la hispana ĉefurbo. Poste li denove iris en Amerikon, kie li kantis ĉe la Cervantesa Festivalo de Guanajuato en Meksikio kaj en Novjorko ĉe la *Lincoln Center* kaj ĉe la *Spanish Institute*. En la jaro 1972 la Katedro pri Flamenkologio de Jerezo havigis al li la Nacian Premion pri Flamenka Kantado. En la jaro 1972 li kantis ĉe la Pariza sidejo de UNESKO.

Dum la postaj jardekoj (80-aj,90-aj 2000-aj) li daŭrigis sian artan laboradon, li kantis kune kun aliaj grandaj flamenkaj kantistoj, kiel *Camaron*, kaj eĉ ne flamenkaj kiel la granada Carlos Cano, ĉar Enrique Morente deziris sekvi novajn vojojn kiuj ebligis la kunligon de la flamenka kantado kaj aliaj muzik-stiloj, kiel la kuba muziko, la ĥorkantado, la nord-afrika, ktp. Tiel, li antaŭenigis la projekton de muzika spektaklo kun la nomo *Espectaculo Africa, Cuba Cai*, kiu estus la kunligo de tri malsimilaj muzikstiloj, tiuj de Afriko, Kubo kaj Andaluzio.

Enrique Morente, do, estis ne nur kantisto konanta la plej purajn kaj antikvajn flamenkajn stilojn, sed li ne haltigis tie, li deziris daŭrigi vojon ebliganta miksigi la flamenkon, kiel arton apartenanta al konkreta popolo: la andaluzo, kune kun aliaj popolaj muzik-stiloj, pro tio li iufoje ricevis malbonajn kritikojn de la plej flamenkaj puristoj, sed ankaŭ la pozitivan agnoskon de la plej junaj flamenkaj artistoj, ĉar li kapablis malfermi novajn vojojn por ĉi tiu antikva arto.

## LASTMOMENTA INFORMO

Kvankam sur la pasinta numero de *GAZETO ANDALUZIA* oni sciigis pri la okazigo de la ĉi-jara Andaluzia Kongreso de Esperanto en Granado, ĝi definitive okazos en Sevilo, por festi la Centjariĝon de la Esperanto-Movado en ĉi tiu andaluza urbo. Nova numero de nia revuo aperos dum la monato septembro kaj ene de ĝi ni informos pri ĉio rilata al ĉi tiu renkontiĝo de la andaluza esperantistaro, tamen se Vi bezonas ĝuste nun pliajn datumojn, bv. kontakti kun ni kaj ni pruvos respondi ĉion rilate: programon, restadon, aktoj....

Kaj ne forgesu rezervi ĉi tiujn tagojn en Via agendo por ĉeesti la 16-an Andaluzian Kongreson de Esperanto:

*Sevilo, 15-a kaj 16-a de oktobro 2011*



**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
Asociación Andaluza de Esperanto**

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López

Sekretario: Julio Herrero Segura

Kasistino: María Dolores Torres Mateo

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)

[esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

Blogo: [www.andaluciaesperanto.blogspot.com](http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com)

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio

Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)

[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio

C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)

[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

# 16-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

En la urbo **Sevilo**

De la **15**-a ĝis la  
**16-a** de **OKTOBRO**  
**2011**

Andaluzia Esperanto Unuiĝo

[www.andaluciaesperanto.blogspot.com](http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com)

**Mau**  
2011